

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2017-01-15 ĝis 2017-04-15.

Eventoj

Februare laŭ la iniciato de la Prezidanto Mireille Grosjean estis preparita nova eldono de dupaĝaj dulingvaj varbiloj pri ILEI en la ses UN-lingvoj: la angla, franca, hispana, araba, rusa kaj ĉina.

Februare la Estraro pritraktis eblajn kandidatojn por la Hamdan-premio de UNESKO. Ĝi estas premio por organizoj. Venis proponoj kandidatigi ILEI mem kaj esploroj, ĉu unu el niaj sekcioj kongruas kun la postuloj de la premio.

Marte la Prezidanto Mireille Grosjean vizitis Beninon, kie ŝi faris statistikan esploron pri la ILEI-sekcioj en Afriko, prelegis dum la Tago de la Gepatra Lingvo. Tiu prelego havis en la Movado pozitivan eĥon kaj venis propono, ke ILEI sendu la tekston al Irina Bokova, la ĝenerala direktorino de UNESKO. Farita.

JARO DE LA LERNANTO (JdL)

Diversaj aktivuloj lanĉis novan projekton “Unu leciono pri EO por ĉiu lerneĵano”. Kompreneble ILEI ne povas resti ekster tia plano, kiu tuŝas instruadon. Pro tio la Prezidanto Mireille Grosjean aliĝis al la laborgrupo kaj forte kontribuis. La detalan informon eblas trovi ĉe ilei.info: <http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>

Ankaŭ la Estraro komencis preparadon al la Tago de Lernado dum UK en Seulo. La temo estis proponita – “Edukado al respektoplena turismo”, kiel en la ILEI-kongreso.

Laŭ la iniciato de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović estis lanĉita nova programero por la ILEI-kongreso – Infana universitato – kiu celas kleran-amuzan programon por la infanoj, partoprenontoj de la aranĝo.

La Internacia Pedagogia Film-Festivalo IPEFF vokis du anoncojn pri po du filmetoj.

La prezento de la kvar plej grandaj sekcioj daŭras en la organo de ILEI IPR.

Vivo de la Ligo

La Estraro kaj la Komisiono pri Regularoj, laŭ la decido de la Komitato en Hungario 2016, komencis trakti statutŝanĝon, kiu estis planita por la jaro 2016-2017. La Prezidanto Mireille Grosjean proponis kelkajn modifojn por la diskuto, inkluzive la aldonon de nova nomo por la Ligo “Esperanto kaj Edukado” por pli facila kaj adekvata traduko al naciaj lingvoj. Estis anoncita diskutfazo.

Komence de februaro la observantoj de ILEI ĉe UNESKO en Parizo anoncis, ke ili poiome deziras kaj intencas retiriĝi de tiu tasko. Ili proponis, ke aliĝu al ili du aŭ tri novaj personoj. La Prezidanto ekrilatis kun 5 sekcioj el la landoj, kiuj situas proksime de Parizo: Francio, Germanio, Nederlando, Belgio, Luksemburgo – kun espero, ke personoj kun disponebla tempo kaj facileco en diplomataj kontaktoj kaj emo de tia medio anoncos sin ĉe la Prezidanto. Rezulte venis sinpropono kaj

post la aprobo de la Estraro nova observanto de ILEI ĉe UNESKO iĝis Emmanuel DESBRIERES el Francio. Li estas instruisto en liceo kaj loĝas ne for de Champagnole, li ofte partoprenas ankaŭ en svisaj kunvenoj.

Koleghelpa Kaso

Februare-marte la Prezidanto kontrolis la liston de la personoj, kiuj membras ĉe ILEI per la Koleghelpa Kaso. Ŝi kolektis la retadresojn de ĉiuj ĝisnunaj ricevantoj de tiu subteno kaj skribis al ili ĉiuj persone. La limdato por anonci deziron plu membri en ILEI estas la 15-a de aprilo. En 2016 en la listo estis 52 personoj. La Estraro taskigis sin esplori pri ilia aktiveco en E-movado, kontakti kun ILEI-sekciestroj, reprezentantoj aŭ kontaktpersonoj. La freŝa listo estos diskutita ene de la Estraro. La fina decido okazos laŭ la stato de la Koleghelpa Kaso. La Estraro esperas je donacoj por nutri tiun nemalhaveblan ilon por ligi ILEI-n al nepagipovaj landoj.

Kongresoj

La 50-a (kaj la 1-a samtempe!) ILEI-kongreso en Busano, Koreio.

Meze de januaro la Prezidanto sendis mesaĝon al KAEM (Komisiono pri Azia EO-Movado) kun alvoko apogi azianojn por partopreni en la ILEI-kongreso en Busano.

Fine de januaro la Estraro komencis prepari la Kongresan libron por Koreio.

En januaro-februaro la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović organizis la konkurson pri emblemo de la ILEI-kongreso en Busano. Venis desegnoj el Koreio, Serbio kaj Rusio. Post diskuto estis elektita per plejmulto da voĉoj la pentraĵo el Koreio, ĉar ĝi estas informativa kaj entenas korean simbolaron. Kaj meze de februaro la oficiala emblemo de la 50-a kongreso estis publikigita en Facebook-paĝo de ILEI kaj disvastigita tra diversaj kanaloj.

Februare la Estraro diskutis la enhavon de la programo por Busano. Taskolisto, buĝeto, kutima laboro por prepari sukcesan eventon.

Marte en *RE* aperis vica komuniko pri la kongreso, preparita de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović, kiu prezentis programan mozaikon de la kongreso: estis anoncitaj kelkaj novaj iniciatoj kaj programeroj.

Februare komencis alveni proponoj pri kandidatiĝo por ricevi subvencion por partopreni la kongreson. La Estraro diligente kontrolis la plenumadon de ellaboritaj kaj aprobitaj kondiĉoj por havi stipendion rilate al ĉiuj petintoj. Al aprilo jam venis petoj el diversaj landoj. Laŭ la stipendikonkurso regularo, ĉiu peto estis traktata tuj post la alveno. La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović tre diligente komunikas kun ĉiuj petantoj pri diversaj demandoj kaj klarigoj rilate al la konkurso.

Ankaŭ la Estraro pripensis por trovi rimedojn por ebligi al multaj koreoj partopreni la ILEI-kongreson en sia lando.

Februare venis konsento, ke Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge gvidos instruistan trejnadon en la ILEI-kongreso kaj lingvokursojn.

La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović helpe de Jozefo Nemeth regule novigis kaj kompletigis la paĝojn pri la kongreso en la retejo ilei.info.

La duan duonon de februaro okazis vizito de Radojica Petrović en Sud-Koreion. La programo de la vizito estis densa kaj fruktodona. Radojica vizitis E-grupojn en Seulo kaj en du aliaj urboj, li instruis en Busano, prelegis pri ILEI, Serbio, pri Esperanto-movado kaj esperantista vivo. En Deajeon li partoprenis la tritagan Vintran tutlandan kurskunvenon por gvidi postbazan paroligan kurson kaj prelegi pri ILEI kaj edukado. Radojica kaj LKK-anoj vizitis la kongresan hotelon Arpina kaj vidis, ke la renkontiĝo havos perfektajn kondiĉojn. Okazis traktadoj kun la respondeculo de Arpina por atingi laŭeble bonajn financajn kondiĉojn.

Evoluas la ideo pri Infana Universitato dum la ILEI-kongreso. Marte la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović konkretigis la planon kaj starigis la programeron, kiu tutcerte interesos infanajn grupojn el Japanio kaj Ĉinio.

Danke al tiu granda laboro la Estraro povas ĝoje konstati, ke aprile jam pli ol 125 personoj aliĝis al la 50-a kongreso en Busano, Koreio. Absoluta rekordo por ILEI en la unua aliĝperiodo!

Venontaj kongresoj

La Estraro komencis pripensojn pri la eblaj temoj de la sekvontaj ILEI-kongresoj – en 2018 detale kaj en 2019 skize kongrue kun la agado de UNESKO kaj aliaj mondaj instancoj. Ankaŭ la Estraro dense traktis la eblajn lokojn por la ILEI-kongreso en 2018 danke al klopodoj de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović.

Aprile tri Estraroj – de UEA, ILEI kaj TEJO komunikis inter si pri ebla, favora por ĉies membraro, sinsekvo de la tri plej gravaj mondaj kongresoj en Esperantujo en 2018, inkluzive ankaŭ SAT-kongreso. Iberio, tio estas Portugalio kaj Hispanio, estas en la fokuso.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

La Jagelona Universitato (Pollando) invitis E-parolantojn al 5-monata kurso de Esperanto gvidota de instruistino vive, en Interreto. La lernado daŭras de la 8-a de februaro ĝis la 25-a de junio 2017. Instruas Maria Majerczak. La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas aldone la markon de la internacia EAQUALS-kvalito de Esperanto-instruado. ILEI diskonigis la eblon studi tiel.

Jam tri sekcioj proponis du novajn Honorajn Membrojn. La Komitato de ILEI en Busano decidis pri tiu propono.

Ekde komenco de la 2017-a jaro la Prezidanto Mireille Grosjean kolektas raportojn pri la agadoj en 2016 en la sekcioj. Tio povas okazi per la helpo de sekciestroj kaj reprezentantoj.

Estraro

Januare la Estraro interkonsentis pri la horaro de sekvaj skajp-kunsidoj. Ili okazis la 28-an de januaro, la 11-an de marto kaj la 1-an de aprilo kaj kutimas daŭri du horojn. Tre efika reciproka informado kaj diskutado okazas per tiu rimedo.

Fine de januaro la Estraro detale pridiskutis pri stipendioj por partopreni ILEI-kongreson en Busano. La kasisto Willjam Harris faris financon prognozon pri la stato de fondusoj por tiuj celoj por 2017-2018. Rezulte la Estraro aprobis kaj lanĉis konkurson pri subvenciado pere de tiuj stipendioj por 3 kategorioj de la partoprenontoj: por 4 infanoj (sence de partopreno en la Infana Universitato), por 10 junuloj – por partopreno en instruista trejnado aŭ progresiga Esperanto–kurso kaj por 8 plenkreskuloj – por partopreno en instruista trejnado. Do, entute por 22 partoprenontoj. La kriterioj estas la samaj kiel por 2016.

Paralele la Estraro decidis komenci kampanjon por allogi mondonacojn por tiuj fondusoj por sekvaj jaroj. Ja stipendioj ebligas involvi en la movadon novajn aktivulojn kaj EO-instruistojn.

La Prezidanto aktive preparas AMO-LIMA-seminaron en Les Brenets (Svislando) kie gvidos Katalin Kovats, Monika Molnar kaj ŝi mem.

Januare la Prezidanto sendis gratulmesaĝon por la sesa sesio en UAM (Poznan, Pollando) kaj al Seŭla Esperanto Centro pro la 300-a kurso tie.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Fine de Januaro finiĝis la translokiĝo de Flandra EO Ligo FEL en Belgio. Do, tuj komenciĝis denove presado de la perditaj IPR 2016/3 kaj IPR 2016/4 kaj poste sendado.

Tamen la Estraro devis konstati, bedaŭrinde, daŭron de la problemoj kun sendado de IPR. La problemoj post la translokiĝo de FEL ne kontentige solviĝis kaj pluaj plendoj venis. En sia lasta kunsido (2017.04.01) la Estraro de ILEI decidis taskigi alian firmaon en Slovakio (en la urbo Martin) pri la printado kaj sendado de la numero 2017/2, kies redaktofinio estas meze de aprilo. Krome, la Estraro daŭre sekvas la situacion en Antverpeno kaj esploras pri ebloj por plua kunlaboro. La Estraro opinias regulajn kontaktojn kun siaj membroj per IPR absoluta prioritato kaj faras ĉion por solvi la problemon. La Prezidanto Mireille Grosjean tenas tiun situacion sub sia aparta kontrolo.

Por iom korekti la situacion, fine de februaro, la redaktoro de IPR Jozefo Nemeth aperigis la jarojn 2011-2015 en la arkivo de IPR en la liga retejo: http://www.ilei.info/ipr/malnovaj_numeroj.htm Li simpligis la alirvojon por elŝutado de la numeroj. Meze de marto li ebligis aliron al la retaj variantoj de la lastaj 5 numeroj de IPR 2017/1. Ankaŭ la ILEI-komisiito pri membroprizorgado Sebastian CYPRYCH dissendis retajn versiojn de IPR al la paperaj abonantoj por iom plibonigi la situacion.

Juna Amiko (JA)

Post preparado de la jubilea 150-a *Juna Amiko* ĝia ĉefredaktoro Stano Marček venis al la ideo fari DVD-diskon kun ĉiuj numeroj de *Juna Amiko*, de 0 ĝis 150, en

pdf-formato. Li brile realigis tiun ideon kaj la disko jam ekzistas kaj haveblas en la libroservo de UEA (<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9461>). Gratulojn al Stano!

ILEI en la Reto

La prizorganto de www.ilei.info Jozefo Nemeth diligente plenigas la paĝaron per diversaj informoj pri la agado de la Ligo sub la gvido de la Prezidanto. Ankaŭ la grupo “ILEI labortable” en Facebook ĉiam havas freŝajn novaĵojn danke al la Prezidanto Mireille Grosjean.

Februare-marte la Estraro dense traktis la kreadon de la nova reta informilo de ILEI – ESPERANTO kaj EDUKADO. La Prezidanto ellaboris koncepton por tiu nova organo. Esploroj plu daŭras.

Ekzamenoj de ILEI – UEA

Sesio okazis en Bunda, Tanzanio, okaze de la sesa Afrika Kongreso de Esperanto kun 25 kandidatoj. Vidu *RE*, januara numero, paĝo 7.

La Prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono Karine Arakeljan el Armenio kune kun Mireille Grosjean verkas novajn testojn por sesio en Greziljono, Francio, en aprilo 2017.

Kunlaboro kun UEA

Januare la Estraro komencis pripensi pri la organizado de AMO-seminario dum la ILEI-kongreso en Busano. Kune kun la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović kaj la kasisto Willjam Harris esploris pri financa apogo de la seminario flanke de UEA kaj ILEI.

Januare aperis en 4 lokoj de la *Revuo ESPERANTO (RE)* diversa informo pri ILEI. Februare en *RE* estis publikigita anonco pri la ILEI-kongreso en Busano-2017 kaj raporto pri la kvina ILEI-Seminario de Orienta Azio en Ĉinio.

Marte estis konsentita kaj komenciĝis kunlaboro inter ILEI kaj la nova redakcio de de la *Revuo ESPERANTO*. ILEI regule liveras materialojn rilate al instruado de Esperanto kaj pri aliaj siaj eventoj. Marte aperis informoj pri la julia kongreso de ILEI, pri la informiloj en ses lingvoj de UNESKO kaj pri la jubileo de *Juna Amiko*. Aprile aperis la kongreso de ILEI en la kalendaro.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

Kunlabore kun la observantoj de ILEI ĉe UNESKO la Prezidanto aktualigis la du-paĝajn informilojn pri la Ligo en la ses UNESKO-lingvoj por oktobro, dato de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO. ILEI buĝetis sumon por reprintado de la 8-paĝaj varbiloj en du versioj, eo-fr kaj eo-en.

Aprile la vicsekretario Elena Nadikova preparis la aliĝpeton al la Organiza Komitato de la 19-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Soĉi (Ruslando), oktobre 2017. Post aprobo de la Estraro kaj subskribo de la Prezidanto la leteroj estis senditaj al la kontakt-persono de la komitato kaj kopie – al TEJO kaj REU (Rusia Esperantista Unio).

Dum januaro-marto la Estraro dense pridiskutis la eblan kunlaboron kun la Esperanto-muzeo en Zaozhuang, Ĉinio kiel la nova granda konservejo por Esperanto ĝenerale kaj por ILEI, laŭ la ILEI-programo “Ni Savu Niajn Semojn”. La Prezidanto Mireille Gosjean post sia vizito al la Universitato de Zaozhuang ellaboris skizon de la kontrakto. Post debatoj la kontrakto estis aprobita de la Estraro sub nova nomo “Interkonsento pri kunlaboro” kaj ĝi rajtigis la Prezidanton interparoli kun la Universitato de Zaozhuang, UEA kaj ĉinaj esperantistoj cele al definitiva formo de tiu dokumento. Vidu artikolon en *RE*, januara numero, paĝo 15.

Kontaktoj kun enmovadaj institucioj

Februare ILEI alvokis siajn anojn partopreni enketon de Edukado.net pri diverslandaj esprimoj pri denaska lingvo.

La paĝaro Edukado.net kun ĝia redaktoro Katalin Kovats helpis disvastigi la informon kaj alvokon pri la projekto “Unu leciono pri EO por ĉiu lerneĵano”.

La Premio Mauro La Torre estis lanĉita en novembro 2016 duan fojon. Ne venis anonco ĝis la tempolimo en januaro 2017.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn!

Vicsekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2017-04-15